# Deklaro pri datumprotekto
# de Germana Esperanto-Asocio

1. Tiu ĉi deklaro enhavas la „devon informi pri registrado de personaj datumoj de la koncerna persono“ laŭ artikolo 13 de la Ĝenerala Datum-Protekta Regularo (*Datenschutz-Grundverordnung*, DSGVO).

2. Respondeca: Germana Esperanto-Asocio (GEA), Katzbachstraße 25, 10965 Berlin infozentrum@esperanto.de. Respondeca estrarano: Andreas Emmerich, andreas.emmerich@esperanto.de.

3. GEA registras personajn datumojn por jenaj bezonoj:
   - membroadministrado,
   - administrado de membrokotizoj,
   - perpoŝta aŭ perreta sendado de membroinformoj, novaĵleteroj kaj de la asocia revuo,
   - administrado de partopreno en kunvenoj.

4. Per membriĝo en la asocio aŭ partopreno en kunvenoj la asocio registras jenajn personajn datumojn:
   - nomo,
   - adreso,
   - naskiĝdato,
   - laŭbezone: telefonnumeroj,
   - laŭbezone: retpoŝtadresoj,
   - laŭbezone: bankkonta numero,
   - parencoj, se membrokotizo por paro/familio/mastrumaĵo estis elektita,
   - individua membreco en Universala Esperanto-Asocio jes/ne.

5. Tiuj datumoj estas tenataj en reta stokejo de profesia servo. Al ĉiu asocia membro estas asignita individua membronumero. La personaj datumoj estas protektataj pere de adekvataj teknikaj kaj organizaj rimedoj kontraŭ la scio de triaj personoj.

   Laŭ artikolo 6, paragrafo 1, lit. b) de la DSGVO la prilaborado de personaj datumoj estas laŭleĝa se ĝi necesas por plenumo de kontrakta rilato - ĉi tie: membreco en la asocio.

6. Por pliaj personaj datumoj necesas skriba konsento de la membro, kun konsidero al artikolo 7 de DSGVO. Tiucele adekvata formularo de la asocio devas esti subskribita de la membro. Konsento pri registrado de pliaj personaj datumoj estas libervole donebla de la membro. La membro povas ĉiam revoki sian konsenton en tekstoformo ĉe la estraro de la asocio sen malfavoraj konsekvencoj por la estonteco (kontakto vidu punkton 2).

7. La federacia estraro publikigas specifajn okazaĵojn de la asocia vivo en interreto aŭ en la asocia revuo, precipe pri okazigo de kunvenoj kaj festoj kaj ties rezultoj. Tiuokaze personaj datumoj (nomo, loĝloko) povas esti publikigataj. La membro povas revoki sian interkonsenton en skriba formo al la estraro sen malfavoraj sekvoj por la estonteco (kontakto vidu punkton 2).

8. Kiel membro de Universala Esperanto-Asocio, la asocio devas raporti personajn datumojn de siaj oficialuloj al la tutmonda asocio. Estas sendataj jenaj datumoj:
   - nomo,
   - membronumero,
   - kontaktdatumoj,
   - funkcio en la asocio.

9. Post la fino de la membreco la personaj datumoj estos blokitaj dum la daŭro de la laŭleĝaj, precipe komercaj kaj impostaj konservodevoj, kaj poste forigitaj de la membroadministra sistemo.

10. La membro havas la rajton ricevi informojn de la asocio pri siaj konservitaj datumoj kaj pri ilia korektado kaj forigo (krom se temas pri artikolo 6, paragrafo 1, lit b) aŭ lit. f) de la DSGVO). Ĉi tio ankaŭ rilatas al limigo de prilaborado de datumoj aŭ rifuzo al transigo de datumoj. Tiurilata peto estas sendenda al la estraro en teksta formo. En kazo de malregistro de datumoj necesaj por asocia uzado la membreco nuliĝas.

11. La membro rajtas plendi. Respondeca pri tio en Berlino estas:

    Berliner Beauftragte für Datenschutz und Informationsfreiheit
    Friedrichstrasse 219, 10969 Berlin, Germanio
    Tel.: +49 30 13889-0
    Fakso: +49 30 2155050
    Retpoŝto: mailbox@datenschutz-berlin.de